

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTO ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Olli Norta, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-  
direktoro, Kaunas.

N-o 154  
26. 8. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
Zanoni (literaturo)  
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)  
Esperanto Triumfonta  
Horrem bei Köln, Germanlando.  
Tarifon  
vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimeno kaj unua numero de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

### Esperanto kaj Eksterdomismo.

La vorton „Eksterdomismo“ mi uzas por enkalkuli ĉiun modernan movadon, aŭ organizaĵon, kiu celas, per reveno al la naturo kaj la natura vivado eksterdome, kontraŭigi la malbonajn rezultojn kaj efikojn de tio, kion oni erare nomas „civilizacio“. En antikvaj, pasintaj epokoj la homoj vivadis, ne nur en naturaj, sanigaj ĉirkaŭaĵoj, sed laŭnature, kaj pro tio ili estis, se ne perfektaj, preskaŭ tiel, en korpa sano kaj forto. Unue, la spirita korpo de la homo evoluigis malrapide, sed ĉiu nova paŝo rapidigis la evoluon procedon, ĝis la hodiaŭa epoko, en kiu ĉio moviĝas en danĝera rapideco. Hodiaŭ, la korpa sano estas preskaŭ forgesata. Ĉiu nuntempe vivadas absolute nenature, kaj la terura, detruiga rezulto estas evidenta ĉie. Estas miloj da hospitaloj, frenezulejoj, malliberejoj — ĉiam plenaj; kaj ĉiutage la bezono por pli da tiaj rifuĝejoj kreskadas. En la mondo regas la haoso kaj neniu povas antaŭvidi la finon.

Nur tiuj, kiuj penas reveni al la naturo, eltrovis la solvon de la problemo, kaj estas kuraĝige rimarki, kiel rapide la „Eksterdomismo“ kreskas kaj influas ĉiutagejn aferojn. Mi ne volas ĉi-tie plene priskribi la ideojn kaj metodojn de la eksterdomismuloj, ĉar mi ŝuozas, ke ĉiu leganto povos por si mem, laŭvole, esplori la temon.

Kune kun la Eksterdomismo kreskas kaj batalas la Eksterdogmismo; kaj Esperantismo estas fako de tiu lasta „ismo“. Mi volas ĉi-tie mallonge priskribi tri eksterdogmismajn kaj eksterdogmismajn movadojn kaj iliajn respektivajn rilatojn al la internacia helpa lingvo Esperanto.

1. La Skolta Movado, laŭ la ideoj kaj intencoj de ĝia elpensinto, unue celis esti nova eduka metodo por movadoj kaj organizaĵoj de junuloj. Siajn ideojn Sir R. Baden-Powell, priskribis en libro „Skoltado por Knaboj“, kiu unue publikigis en dusemajnaj partoj. Baldaŭ post la apero de tiuj partoj, la knabaro mem, en multaj lokoj en Britujo, alprenis la proponojn de „B. P.“ kaj formiĝis en „rotaj“ por ludi la ludon de skoltado. „B. P.“ tial trovis, ke li devas fariĝi la Skolta Ĉefo kaj estri la novan movadon. Tio, mallonge, estas la historio de la komenco de la Brita Skolta Movado.

Unue, ĝi estis pure nacia movado, celante forigi la malamon kiu ekzistas inter „klasoj“; ansiataŭigi la egoistan vivadon per vivado je servado al aliaj.

La internacia flanko evoluis pro tio, ke edukistoj el aliaj landoj studis la metodojn de la Brita Movado, kaj ilin alprenis, kun kelkaj ne-similaĵoj, necesaj pro lokaj cirkonstancoj. Eĉ de la komenco, oni kuraĝigis la amon al ne-Britoj, sed nur estis post la Granda Milito, ke la movado alprenis vere internacian karakteron, kiu tamen ne estas perfekta.

En la jaro 1920 okazis en London, ĉe „Olympia“, la Granda „Jamboreo“ — granda kongreso de skoltoj el multaj landoj — kaj dum tiu internacia kongreso la estroj de la naciaj movadoj elektis la elpensinton de skoltismo „Skolta Ĉefo de la tuta Mondo“. De tiam oni okazigos internaciajn jamboreojn regule kaj oni starigis internacian reprezentantaron.

Eĉ nun la movado, kvankam ĝi faras tre multon por la estonta bono de la mondo, ne estas perfekta; ĝi, same kiel aliaj movadoj, ne estas tiel perfekta, kiel ĝia idealo. Komprenoble, post la granda milito preskaŭ ĉiu homo aliigis siajn kredojn pri la neceseco — aŭ malneceseco kaj malutilo — de milito; kaj la Skolta Movado tendencis, kaj efektive fariĝis, pli ol iam antaŭe, paco-cela movado. Dum la 1920-a Jamboreo Sir R. Baden-Powell skribis: —

„Estas hontego por ĉiu civilizita viro kaj virino, ke milito kaj ĝiaj kruelaĵoj estas eblaj. Estas hontego por edukado kaj religio, ke la plej bona parto de nia junularo estas edukata

por mortigi kaj mortigi; kaj parto de nia industriistaro kaj laboristaro okupiĝas je preparado de materialo por la morfado de niaj homfratoj, kreitaĵoj de Dio.

Oni juĝas la raĵon, ne laŭ justeco, sed laŭ nia kapablo mortigi pli el la malamikaro ol ni mem perdas.

Estas vere, ke tiom longe kiom aliaj nacioj retenas armitajn soldatarojn ni, en la Brita Imperio, devas fari same, por la protektado de niaj hejmaro kaj bonstato. Oni ne povas forigi militon per forigo de la armeo, same kiel oni ne povas forigi krimon per forigo de la polico.

Estas afero de edukado al la popolamasoj de ĉiu lando, kompreni, ke la raĵo estas afero de justeco kaj konsiderado, ne afero de potenco kaj mortigado, ke se altan senton de honoro kaj justeco posedus ĉiuj ŝtatoj, kaj senton de reciproka fido kaj simpatio ĉiuj popoloj, milito cedus al arbitracio kaj la fortoj de perforto al la povo de justeco.

Sed per vivado laŭ radicio kaj historio, la diversaj popoloj estas edukitaj pensi laŭ terminoj de milito, tuj kiam malfacilaĵo ekaperas inter ili. Estas esence, tial, ĉar la pli juna generacio en la unua paŝo devas esti edukata pensi laŭ terminoj de paco kaj abono al milito. La granda milito donis al ni la plej bonan objektivan lecionon.

La kunigo de la junaj generacioj de diversaj landoj en reciprokan rilaton kaj simpatian sub komuna idealo, kiel oni faras nun per la knab-skolta kaj skoltina movadoj, estos la plej bona paŝo al la naskiĝo, ĉe la estontaj civitanoj, de la spirito, kiu estas nepre necesa, por ke la Ligo de Nacioj fariĝu io pli ol nur formala interkonsento inter registaroj.“

Dum la 1920-a kongresego de la tutmonda skoltaro la malfacilaĵo de diversaj lingvoj evidentiĝis. Jen estis plej bona pruvo, ke Internacia lingvo estas bezonata de la skoltaro. La Ĉefo komprenas, ke la „kunigo de la pli junaj generacioj de diversaj landoj“ helpas al la estonta paco de la mondo. Li tamen ignoras la plej saĝan kaj plej facilan rimedon por tiu kunigo — Esperanton.

La Ĉefo, en sia libro „Skoltado por Knaboj“ rekomendas skoltojn lerni Esperanton, kiel rotan privatan kodon. Lastatempe li favore menciis Esperanton, sed li plifavoras la latinan lingvon.

La Brita Skoltestraro faris preskaŭ nenion; malgraŭ la fakto, ke la Skolta Esperantista Ligo jam funkciis dum kvar-kvin jaroj kaj ofte komunikis kun la ĉefsidoj en London. Ofte unu el la oficistoj de la Ligo tradukis leterojn el Esperanto por la Internacia Oficejo. Kial la Ligo ne ricevis la subtenon kaj kuraĝigon de la Brita Estraro, mi ne scias. Eble ili timas, aŭ ne volas, anstataŭigi la anglan lingvon per Esperanto. Eble ili opinias, ke la internaciismo de Esperanto kontraŭstaras al ilia imperialisismo. Mi nur donas mian privatan opinionon kaj ŝatus scii la opinionon de la Estroj. Estas malfacile eltrovi tion, sed tuj kiam mi scios tion, mi informos la Esperantistaron.

2. La Brita Skoltmovado fariĝis organizaĵo kaj estis danĝero, ke la trupestroj forgesus la originalajn eksterdomajn aktivecojn. Pro tio fondiĝis la movado „Kibbo Kift“, movado pure eksterdoma kaj eksterdogmista.

„Kibbo Kift“ estas malnova angla esprimo, kiu signifas „La Fortulo“ aŭ „Pruvo de Granda Forto“. Ĝia iniciatinto „White Fox“ („Blanka Vulpo“) originale celis enkonduki en la skoltan edukadon la Arbarismon per pitoreska ceremoniaro. Li malkaŝe kritikis la militan flankon de la skolta movado kaj ties tendencojn forgesi la originalan arbarisman celon. Pro lia malkaŝemo oni eksigis lin. Li estas entuziasma internaciisto. La celo de „K. K.“ estas re-konstrui la socion per reiro al naturo; reiro al la natura hardeco de la antikva sovaĝulo kune-kun-reteno de la lerteco kaj inteligenteco de la modernulo. La movado estas pure internacia; la anoj vivadas kiel eble plej

multe eksterdome en la freŝa aero; ili portas pitoreskan kostumon; ili studas ĉion estetikan; ili kontraŭbatalas imperialismon kaj ĉiun maljustan perforton. Ĉiu individua ano laboras por la komuna celaro laŭ sia propra plaĉo. La jena traduko de la interkonsento, kiun ĉiu ano subskribas, klarigas sin mem.

„Per ĉi tio mi deklaras, ke mi, la subskribinto, volas federigi kiel Individua Laboranto de Kibbo Kift, la Arbarisma Frataro, por ke, per niaj kunigitaj penoj, ni helpu: —

1. Kontraŭigi la malbonajn rezultojn de industriismo kaj troamasigado en urboj kaj civitoj, donante al la unua generacio okazon je plena edukigo (en kiu Eksterdoma Vivo estas grava faktoro) per la starigo de Arbarismo-Grupoj, Lokaj Tendaroj, Teraj Reservaĵoj kaj Malfermitaj Spacoj por Eksterdoma Edukado kaj Naturmetioj.

2. Per tiaj klopodoj admoninstrui en la infanon, unue, respekton al la korpo; due, mensan ekvilibron; novan kaj vivigitan spiritan koncepton per servado al aliaj kiel praktikan esprimon de adorato al la Granda Spirito.

3. Nutri kaj kuraĝigi per la formado de Metio-Edukadaj Grupoj por pliaĝaj geknaboj ĉian utilan metion kaj industrion kaj rekomendi la formadon de Metio-Gildoj.

Re-organizi industrion efike sur ne-konkursa bazo; certigi sanajn kondiĉojn de laborado por ĉiu procedo de produktado kaj distribuado, kaj starigi kooperativajn laborejojn ekster la grandaj industriaj centroj; por tiu celo la elektrigo de la tuta lando estas dezirinda.

4. Antaŭenigi tian sociajn kondiĉojn, ke homoj, edukitaj laŭ arbarismaj metodoj, starigos Familiajn Grupojn por ke la infanoj el tiaj geedziĝoj havu heredaĵon de sano, kiun ili povos gardi kaj transplanti.

5. La formadon de lokaj arbarismaj kunvenoj, aŭ Popolaj Kunvenoj de la Frataro, labori per la komuna feliĉo de ilia propra distrikto, igante la kunvenojn, centron de loka aktiveco, agante kiel gardantoj de subĉielaj lernejoj, aŭ lernejoj tendaroj, per la akirado kaj konservado de lokaj tendaretoj, per la organizado de lokaj sportoj, festoj, kaj ceremonioj kaj per la ĝenerala evoluigado de ilia distrikto al sano de korpo, menso kaj spirito.

6. Montri, ke samtempa internacia malarmigo estos ebla tuj kiam lokaj naciaj kaj internaciaj komercaj kaj politikaj interrilatoj estos direktataj laŭ spirito de komuna frateco; antaŭenigi ĉi-tion ni rekomendas revizitan sistemon de edukado pri tutmonda historio.

7. Kaŭzi:

- internacian edukadan planon bazitan sur la supre-diritaj proponoj.
- internacian liberecon de komercio, kun marvojoj, aervojoj, kaj landvojoj liberaj al ĉiu.
- internacian monsystemon kaj la stabiligon de la aĉetopovo de mono en ĉiuj landoj.
- la forigon de sekretaj interkonsentoj; la sekreta diplomatio estu anstataŭata de libera intertraktado.
- la starigon de Tutmonda Konsilantaro, enhavanta ĉiun civilizitan kaj primitivan nacion aŭ rason.“

La anoj de „K. K.“ tre simpatias al nia Esperanto-afero, ĉar ili estas unue internaciistoj kaj kontraŭagas ĉion imperialistan. Kelkaj el ili jam studas la lingvon kaj „Blanka Vulpo“ promesis al mi persone antaŭenigi ĝin inter la ceteraj anoj. Li jam antaŭvidas la malfacilaĵojn, kiuj sin prezentos kiam, en estontaj jaroj, K. K.-anoj el multaj landoj kunvenos kaj pro tio li volas pretigi.

3. „The Open Road“ („La Libera Vojo“). Mi jam klarigis en ET, kiel ĉi-tiu gazeto estas starigita anstataŭ „The Trail“. Ĝia celo estas kunligi ĉiujn organizaĵojn kaj individuojn, kiuj havas samajn celojn kaj idealojn pri eksterdomismo kaj eksterdogmismo. Pro tio, ke la eldonantoj antaŭvidas la Ligon de la Homaro, ili tuj donas sian subtenon al Esperanto. Nun, pro tio, ke nur malmulta

Esperantistoj legas la gazeton, oni ne rajtas aperigi mulkon, aŭ en, aŭ pri Esperanto. Ili tamen publike anoncas, ke per la internacia lingvo ili havigas raportojn pri eksterdomismaj kaj eksterdogmismaj aferoj el ĉiu parto de la mondo. Mi, kiu jam estas propaganda fakestro de la Skolta Esperantista Ligo, kompreneble faras mian eblon antaŭenpuŝi la interesojn de Esperanto kaj S. E. L.

Ĉiuj tri ĉi-tie menciitaj movadoj celas al preskaŭ la sama idealo; tial estas la devo de ĉiu Esperantisto helpi kaj kunlabori kun ili, speciale kun la du lastaj, kiuj pli simpatias kaj aktive helpas al Esperantismo. Esperanto nur estas rimedo por pliforta interkompreno inter la diversaj rasoj kaj nacioj: Tial oni devas ne nur klopodi pri la lingvo, sed ankaŭ interesiĝi pri unu aŭ alia el la ceteraj movadoj, kiuj celas la edukadon laŭ naturan de la gelunularo. Internacia lingvo faras multon por plibonigi la interrilatojn de la mond-nacioj, sed ĝi mem ne aligis la malbonaĵojn kaj mallustajojn de la mondo.

Tial mi humile proponas, ke kiel unuan paŝon la Esperantistoj subtenu siajn fratajn movadojn, skoltismon, Kibbo Kift, kaj „The Open Road“. Unueco estas forto. „The Open Road“ malfermos pli larĝe siajn paĝojn al Esperanto, se la Esperantistaro donos sian subtenon. Eĉ nun la gazeto portas la standardon de la verda stelo inter miloj da anoj de eksterdomismo kaj eksterdogmismo. Mi plezure respondos laŭ mia eblo ĉiujn demandojn pri la tri supre-menciitaj movadoj kaj bonvenigos proponojn pri rimedo por pli-rapide antaŭenigi la Ligon de la Homaro. Mi invitas pensantojn kaj verkistojn Esperantistajn sendi al mi artikolojn por „The Open Road“, kiujn mi aŭ tradukos en anglan lingvon aŭ publikigos en Esperanto.

J. W. Leslie,  
Eksterlanda Redaktoro, The Open Road,  
Denison House, 296 Vauxhall Bridge Road,  
London, S. W. 1. Angl.

## Lausitz'a Esperanto Semajno.

Ni ĵus ricevis la sekvantan telegramon:

Lausitz'a Esperanto Semajno pro ekonomiaj cirkonstancoj prokrastota. Precizaj informoj sekvos.

## La fizika-teknika problemo de la estonto.

En la evolucio de la ekonomia vivo dum la militjaroj kaj en la tempo sekvinta al ili okazis fundamenta ŝanĝiĝo kompare al antaŭe en tio, ke ne sole la krudmaterialoj altiĝis laŭ konsiderinda mezuro en sia valoro, sed ankaŭ en tio, ke la energio, kia ajn forma, fariĝas pli kaj pli unu el la plej altvaloraj komercaĵoj. Antaŭe ĝi estis relative malkara laŭ prezo kaj ĝuste sur tiu malkareco bazis tiam la potenco evoluo de la tekniko kaj la alta stato de la kulturo. Sekve de la energi-malŝparo dum la milito farita ĉiurilate en plej granda stilo, la prezo de la energio altiĝis tiom, ke la nemezureblo, ke ĝi hodiaŭ estas la unua faktoro de la ekonomia vivo. Sub ĉi tiuj cirkonstancoj unu el la plej gravaj demandoj de la estonto estas la demando, ĉu estos eble eltrovi novajn fontojn de energio. En la sekvantaj linioj estu montrata, kian gravan novan problemon prezentigas ĉi-tiurilate la moderna fiziko.

Energion oni nomas, laŭ la hodiaŭ valorantaj fizikaj reguloj de ekono, la kapablecon de korpo aŭ de komplika sistemo produkti laboron. Tial oni mezuras la energion per la samaj unuoj kiel la laboron kaj diras ekzemple, ke sistemo posedas energi-volumon de 3000 metro-kilogramoj, t. e., ke ĝi povas levigi 3000 kilogramojn ĝis la alteco de 1 metro aŭ, kio estas la sama, 1 kilogramon ĝis la alteco de 3000 metroj.

Inter la energi-formoj, kiujn ni uzis en nia ekzemplo, la mekanika energio estas la plej konata kaj estas la plej klara al la instinkta kompreno. Ni scias el la streĉado, kiun ni devas fari, levigante pezan objekton, ke konsiderinda laborpovo estas supozata de nia muskola forto.

Estas la plej alta tezo de la doktrino pri energio, ke energio neniam povas ekestiĝi aŭ malaperi, sed ke en ĉiuj okazantaĵoj sole agiĝas pri ŝanĝiĝo de la formo, en kiu estas la energio. Ekzistas granda nombro de energioj. Ĉe la menciita levigo de la objekto la energio proviziĝinta en la muskoloj transformiĝis je energio de la pozicio de la alte kuŝanta korpo kaj tiu ĉi energi-formo povas esti liberigata kaj transformigata kiel alia energi-formo.

La energio de la pozicio (potenca energio) ludas grandegan rolon en la ekonomia vivo kiel energi-fonto. Ĝi estas eluzata en la kaskadoj, en kiuj la akvo falinta en certa distanco, fordonas la energion al maŝinoj kaj produktas elektran energion. Kaskado konsekvence estos des pli valora ju pli granda estas la nivela diferenco, en kiu falas la akvo kaj ju pli grandaj estas la akvo-amasaĵoj. Ĉe la grandaj kaskadoj en la naturo agiĝas pri kolosaj energi-amasaĵoj, kiuj ludas ĉiam pli grandigantan rolon por la ekonomia vivo. La transformigo en elektra energio rekte je la kaskado ebligis ekonomie eluzi la energion, ĉar la

energio elektra en altfensia stato povas facile esti kondukota en la malproksimecon sen grandaj perdoj.

En la ekonomia vivo la elektra energio esence ludas sole la rolon de peranto. La naturo ja rekte prezentigas ĉi tiun energi-formon en la fulmotondroj, tamen ĝis nun oni ne ankoraŭ sukcesis ekonomie ĝin eluzi eĉ laŭ plej malgranda mezuro.

La energio ofte transformas sin rekte en moveca energio (kinetika energio). Stono, kiun oni faligas de turo, alveninte ĉe la piedo de la turo provizigis en si la energion kiel kinetikan.

Ĝia grandeco dependas de la materio de la ĵetajo kaj precipe de ĝia rapideco. Ĉiu korpo formoviĝanta en rapideco enhavas kinetikan energion. Pafotajo de ekzemple 20 gramoj havos en rapideco de 500 metroj dum sekundo la relative kolosan energi-volumon de 250 metro-kilogramoj. Tio estas: ĝi povus fari la laboron levigi 1 kilogramon ĝis alteco de 250 metroj. Tiu ĉi energi-formo ludis gravan rolon dum la milito. Granda parto de la malŝparita energio estis eluzita por ĝia produktigo. La kinetika energio de la vento havas teknikan signifon kiel forto-fonto.

Apud la mekanikaj energioj la varmececa energio estas grava por la mastrumado de la naturo kaj por la ekonomia vivo. Ĝi ankaŭ sole estas formo de la natura energio. Per helpo de la leĝo pri la konservado de energio estas eble kalkuli laŭnombro la transformiĝon de la mekanikaj energioj kiel varmecaj energioj. Kiel unueco servas la tiel nomata kilograma kalorio t. e. la varmkvanto por varmigi kilogramon da akvo je unu grado. Precizaj mezuradoj rezultigis, ke 427 metrokilogramoj egalas al tia varmunuo.

Se oni do kaŭzigas energi-ŝanĝiĝon tiamaniere, ke la tuta mekanika energio aliformiĝas kiel varmenenergio, tiam ekestiĝos por po 427 metrokilogramoj unu kilogramkalorio. La aliformiĝo de mekanika energio kiel varmenenergio estas praktike de malgrava signifo. Kontraŭe la returna vojo, la aliformiĝo de varmenenergio en mekanika energio estas la plej grava. La kaŭzo estas en tio, ke en la naturo ekzistas materioj, el kiuj oni senpene povas ĉerpi varmenegion kaj plue, ke samtempe mekanika energio estas tiu formo de energio, kiun oni bezonas en la energi-konsumejoj de la ekonomia vivo.

Estas apenaŭ necese atentigi, kian superantan signifon havas la varmenenergio hodiaŭ por la tekniko kaj sekve por la ekonomia vivo. La karbprovizaj ebligas gajni varmon en grandaj amasaĵoj en formo teknike uzebila. La energio ne enestas senpere en la karbo kiel varmececa, sed kiel kemia energio, kiu nur liberiĝas dum la brulado t. e. ĉe la kombiniĝo kun la oksigeno de la aero. La kemia procedo de la brulado estas akompanata de la liberiĝo de grandaj kvantoj da varmececa. Ĉe la brulado de 1 gramo de karboksido oni disponas pri 8 kilogramkalorioj, do pri energi-kvanto, kiu estas ekstreme alta kompare al ĉiuj aliaj energikvantoj de la naturo, kunigitaj al malgranda amaso. Ekzistas ja brulmaterialoj, kiuj posedas ankoraŭ pli grandan brulvarmecon. Tiel ekzemple estas liberigata 11 kilogramkalorio ĉe bruligo de unu gramo da petrolo, ĉe la bruligo de unu gramo da hidrogeno eĉ 34 kilogramkalorioj. Tamen la teknika signifo konsistas en la alta bruligvarmececa de la karboksido. Ĝi montras kiom eksterordinare grandaj estas la energi-provizoj, kiujn ni posedas en la karbminejoj. Al tio aligis la ĉefa fakto, ke sole estas relative malgrandaj amasaĵoj, per kiuj povas esti transportataj tiom kolosaj kvantoj de energio, ĉar la alia kemia materio necesa por la kemia procedo, la oksigeno, estas ĉie trovebla. La karbo reprezentas sole 12 onojn da kvanto dume 32 onoj estas gajnataj el la atmosfero.

\* \* \*

Oni devas ankoraŭ esplori, de kie devenas la diversaj energi-formoj, nome la potencenergio de la akvo en la akvofaloj, la kinetika energio de la vento kaj la varmececa energio de la karbo. Estas sen dubo, ke ĉiuj eliris de komuna centro, troviĝanta sur la suno. La nemezurebla varmprovizo de la suno fordonas daŭre per ĝia radiado parton de la varmececa al la tero. La el la radioj alveninta energio ĉirkaŭumas 0,5 kilogramkaloriojn en sekundo por ĉiu kvadratmetro de la tera supraĵo.

La grandaj meteorologiaj okazaĵoj kaŭzitaj el tio suprenigos la akvon al la montar-altaĵoj, gvidas ĝin al la alteco de la kaskado kaj samtempe donas la kinetikan energion de la vento al la aeramasoj de la aersedimentoj proksimiĝantaj al la tero. La varmenenergio de la suno enigis la karbonon en la plantojn, kiuj per la putriĝado dum jarmiloj kreigis la karbotavolojn. Tiamaniere la karbotavoloj reprezentas kolosajn provizojn de sunenergio iam enradiigita kaj la kaskadoj kaj la vento koncentriĝon de sunenergio de la lastaj tagoj, semajnoj, monatoj.

Dume oni povos disponi pri la energio de la kaskadoj tiel longatempe kiel okazas enradiado, la malnovaj kolektiĝoj, la karbotavoloj elĉerpiĝos. Oni povas kalkuli laŭ la grandega konsumo de la karbo, ke tio okazos post ne tro malproksima tempo. Estos problemo konstati, ĉu estos eble

almaniere plenigi la mankon, kiu tiam ekestiĝos en la bezono. Tre facile ŝajnas, provi, iel kolektigi la sunenergion. Hodiaŭ oni ne jam povas antaŭdiri, ĝis kia grado oni sukcesos pri tia intenco. Tamen dum la lastaj jardekoj pli kaj pli montriĝis energi-fonto, kies ekspluato iam estos de plej granda signifo por la tekniko kaj la ekonomia vivo.

La radio-aktivaj fenomenoj, tiu revolucia elemento de la scienco, alportis la unuajn sciigojn al la homaro pri la estonta energi-fonto. La elementoj kun alta atomeco, inter kiuj estas la plej konataj la uranio, la radiumo, la polonio, la torio, la aktinumo kaj la gasofarmaj emanajoj, elirigas de si radiadon, kiu unue ŝajnis tre enigme, kiu tamen hodiaŭ kaŭze de la jam pli profunda sciado pri la esenco de la atomoj facile eniĝas en la ĝeneralajn fizikajn procedojn.

Laŭ la antaŭtempa koncepto la atomoj estas la plej malgrandaj kaj nedivideblaj eroj de la materio. Kaj ĉiu elemento havas specialspecan atomon, havante nenian komunan kun ĉiu el la aliaj. Ĉi tiun teorion pri la esenco de la elementoj oni intertempe forlasis.

Oni sukcesis penetri en la internon de la atomoj, esplori ilian konstonon kaj klarigi per tio nombron de fizikaj fenomenoj. En tiu ĉi procedo krom plej malgrandaj materioj la elektraj eroj ludas gravan rolon. Multnombraj rezultatoj de eksperimentoj kaŭzis la konkludon, ke ankaŭ la elektro konsistas el plej malgrandaj eroj, kiujn oni konsideras kiel elementarkvantojn. La elementarkvanto havas la nomon: elektrono.

Estas konate, ke la atomoj de la diversaj elementoj diferencigas unu de la alia en la pezo. La hidrogeno estas la plej malpeza. Ĝian atoman pezon oni difinis per la nombro 1. Ĉiuj aliaj estas pli grandaj; ekzemple arĝento havas la nombron 107,88, la plej peza elemento uranio 238,2. Estas memkompreneble, ke la atomkonstruo fariĝas des pli komplika, ju pli alta estas la atoma pezo.

Laŭ la fenomenoj kaŭzitaj el la atoma konstruo — do de la fenomenoj de la lumradiado de radiantaj saloj, de la Roentgen'a radiado de metaloj kaj precipe de radio-efikaj radiadoj — atomo estas konstruata laŭ jene: En la mezo estas kerno de relative minima amplekso, en kiu koncentriĝas la tuta materio. Kaŭze de tio cirkulas laŭ diversaj vojoj elektronoj. Por la diversaj elementoj oni difinis la nombron de la cirkulantaj elektronoj. Ĉe hidrogeno ĝi estas 1, ĉe arĝento 47, ĉe uranio eĉ 92. La kerno enhavas pozitivan ŝarĝon; kiu estas tiel granda kiel la sumo de la ŝarĝoj en la elektronoj, cirkulantaj ĉirkaŭ la kerno.

La cirkulantaj elektronoj povas ŝanĝi siajn vojojn, kaj per tio ili elradiigas energion, la radiadan energion de la lumaj kaj Roentgen'aj radioj. Tamen la ĉefan energi-produktadon enhavas la kerno, kaj ĝi estas la energi-produktado, kiu nin interesas en ĉi tiu rilato. La materio, kiu ĝin formigas, konsistas el atomoj de helio kaj hidrogeno.

La elementoj do ne sole havas rilatojn per la komunaj konstrueroj de elektra speco, sed ankaŭ iliaj materioj estas sekvo de tio.

La kerno tamen estas ankoraŭ pli komplika ol ĝis nun estis indikita. Por koheri la diversajn pozitivajn ŝarĝojn, kiuj elektre malrespondas, la kerno enhavas ankaŭ negativajn elektronojn, la tiel nomatajn kernelektronojn.

Ĉiuj nomitaj kerneroj, nome la substancoj de helio kaj hidrogeno kaj la kernelektronoj estas tiel forte koherigitaj kaj sekve de tio enhavas tiel grandan havaĵon de energio, ke jen ekestiĝas energi-fonto de tiaj grandeco kaj koncentrita formo, kompare al kiuj la energi-havo de la karbo ŝajnas tre minimume laŭ grandeco kaj koncentriĝo. Disocia tiun ĉi energi-havaĵon estas la fizika-teknika problemo de la estonto.

La naturo mem okazigos tion, kion ni celas kaŭzigi. La radioefikaj elementoj, nome la elementoj kun la tre granda kernŝarĝo estas tiel komplikaj hipertrofaj kreitaĵoj, ke ili ne plu estas stabilaj kaj kreviĝas. Tio, kion ni nomas radio-aktivan radiadon konsistas (krom la tiel nomata gama radiado) el hajlo de elfugantaj kerneroj. Ambaŭ specoj de la disigo kaŭzas la ekziston de du diversaj radispecoj, alfa ( $\alpha$ ) kaj beta ( $\beta$ ) radioj. La eksigitaj eroj havas grandan kinetikan energion, kiun ili akiris el la energi-provizo en la atomoj. Kontaktante al ĝi radium-preparaton kaj kaŭzante ĉe la repelo sur la pario ktp. transformiĝon de la kinetika energio en varmo, oni ekkonstatos konsiderindan varmigon de la preparato. Precizaj mezuradoj rezultigis, ke 1 gramo da radiumo produktas 122 gramkaloriojn dum 1 horo. Kaj la radiumo havas tiel grandan vivodaŭron, ke nun post du mil jaroj ĝi distiĝas je la duono. La varmenenergio, kiu liberiĝas dum la tuta radio-aktiva disigo de la radiuma preparato do estas ege granda.

Per tio la tuta atomenergio de la radium-atomoj ne jam estas eluzita. La atomeco malgrandiĝis ĉe tiu ĉi ŝanĝo de 226 je 221, do sole je 5 unuoj. La radioaktive eligitinta energio sekve estas sole malgranda kvanto de la tuto entenata en la radiumatomoj.

La radioaktiva disigo evoluciĝas laŭ reguloj, kies laŭtempa okazado estas matematike konata, tamen ne povas esti influigataj de eksteraj efikoj. Eĉ la plej grandaj fortoj, pri kiuj ni disponas, restis ĝis nun malpotencaj. Tio estas la propreco de la radio-aktiva disiga procedo.

El la fakto, ke oni ĝis nun ne jam sukcesis plirapidigi la disigon kaj laŭvole utiligi libere la internan energion de la atomoj por teknikaj celoj, oni ne povas konkludi, ke la tuta problemo estas nesolvebla. La sciencisto Rutherford sukcesis en la lasta tempo fari la unuan paŝon sur tiu ĉi vojo. Ĉe la radiigo de gasomolekuloj per alfa-radioj li atingis eksperimentajn rezultatojn, kiujn li povas sole klarigi sin, supozante ke la azota atomo estas disigata kaj dispartigata en heliumo kaj hidrogeno. Kio estas ebla per tiu ĉi elemento, devas ebligi en estonto per aliaj elementoj.

Kiam la problemo estos solvita, tiam verŝajne tiuj elementoj por la eluzigo de la atomenergio estos la plej altvaloraj kaj multekostaj, kiujn havas la plej komplikaj konstruaĵoj kaj sekve posedas la plej grandan energion. Hidrogeno, kiom ajn granda estos ĝia bruliga varmo, ne ludos rolon en la estonteca varmekniko. Tamen uranio, la elemento kun la plej komplika kernkonstruo estos la plej altvalora kaj plej bone pagota.

Kiel mi diris, oni faris nur moderan ekkomencon. Kia estos la plena evoluo, oni nature ne povas antaŭdiri. La jam alta evoluo de la atomfiziko ne malebligas, ke la problemo estos solvota kaj ke la generacio vidinte kiamaniere la homoj lernis flugi, kiu survivis la plej grandan militon, travivos ankaŭ la solvon de la energiproblemo. Kiam la fiziko preparis la vojon, tiam la tekniko devos solvi la taskon liberigi la atomenergiecon kaj teknike utiligi ĝin.

La epoko de la atomtekniko hejtos per atomoj anstataŭ per karboj.

Laŭ Dr. L. Thor. (R. Kr.)

## Esperanto

### kaj la komisiono por intel. kunlaboro en la Ligo de Nacioj.

En diversaj gazetoj ni legis la sekvantan novaĵon malfavoran al Esperanto, pri kiu oni jam informis dum la XV-a en Nürnberg:

„La komisiono de intelekta kooperado, komisiita de la Ligo de Nacioj pri la demandoj koncerne al instruado de Esperanto kaj al problemoj de internacia helplingvo, decidis ne rekomendi artefaritan lingvon al la atento de la Ligo de Nacioj, konsiderante, ke ĝiaj penoj devas aspiri antaŭ ĉio al favorigo de la studo de vivantaj lingvoj kaj de fremda literaturo, studo, formanta unu el la plej potencaj iloj de intelekta kaj morala alproksimiĝo inter la homoj de diversaj nacioj.“

Parolante pri tio, „L'Ere Nouvelle“ (9. 8.) Paris, tre prave skribas: Ĉu oni devas konkludi, ke la komisiono ne atentigis pri la raporto pri Esperanto de la ĝenerala sekretario, akceptita en la kunveno de 21. septembro 1922 kaj kiu restas oficiala dokumento. Ĉu ĝi apogis sin je teoriaj argumentoj aŭ ĉu ĝi havis aferon nur kun unu aŭ kelkaj delegitoj, ricevintaj de siaj registaroj mandaton kontraŭbatali Esperanton?

Rim. de Red.: Ĉu la daŭra kaj ampleksa uzo de Esperanto per la Internacia Laboroficejo, subinstitucio de la Ligo de Nacioj, ne estas sufiĉa pruvo pri la taŭgebleco de Esperanto kaj ĝia praktika apliko, kaj ĉu ni tiam bezonas ankoraŭ la decidon de tia intelekta komisiono?

## Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas scilgoin (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj scilgoin) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

### Landoj.

#### Brazilio.

Pernambuco. Recife. Je la 19. decembro fondiĝis grupo nomata „Esperanta Volley-ball Klubo“, kies estraro estas la jena: prez. s-o Jeronimo Santos, ĝen. sek. s-o M. Oscar d'Assis, l. sek. s-o Domingos Pinto, oratoro s-o Oséas E. Santo, kas. s-o José Gomes. La 2. januaro ĝi starigis lernejon por la instruado de Esperanto, kies kursoj estas gvidataj de s-oj Oséas Santos kaj Oscar d'Assis.

Bahia. S. Salvador. Je komenco de la jaro la „Liga Fraternalista Universal“ okazigis feston, dum kiu s-o Carlos Sepulveda faris laŭdan paroladon pri Esperanto. La oficiala lingvo uzata de tiu Ligo por la korespondado eksterlandan estas Esperanto.

#### Ĉeĥoslovakio.

Praha. „Ĉeĥoslovaka Ekperanta Instituto“ estis fondiĝinta en Praha de kelkaj neŭtralaj Esperantistoj je iniciato de s-o Piliĥ. La instituto, kiu rajtas fondiĝi filiojn en la tuta ŝtato, celos per scienca kaj faka laboro disvastigadi kaj profundigadi la scion de Esperanto, subtenadi morale la ceterajn Esperanto-instituciojn en Ĉeĥoslovakio fariĝi faka konsilanto por la ŝtataj oficoj, influaj rondoj kaj interesigantoj pri la internacia helplingvo kaj pere de Esperanto diskonigadi la ĉeĥoslovakajn aferojn.

Ĝi zorgos fondi en Praha „Esperantistan Hejmon“, publikajn Esp. leĝojn, bibliotekon kaj fakan informojn. Informoj kaj respondoj sole per respondokuponon. Prov. adreso: A. Piliĥ, Praha II, 1999.

#### Francoj.

Pro la ferioj la movado estas dormema.

La 6. julio okazis fonda kunveno de „Asocio por franca komerca disvastigo per Esperanto“ en Paris. La definitiva komitato estas jena: Prez. D-ro med. Nuyts, direktoro de la Akcia Societo de dentobrosoj „Dentclair“; vicprez. s-o P. Gourlay, ĉefredaktoro de ĵurnalo „Le Cuir“ (La ledo); sekr. s-o Denny. dipl. ing. de la firmao „Clé Diamant Denny & fils“. La komitato konsistas el 12 membroj el la banka, komerca kaj industria medioj.

La 29. julio la Esp. grupo de Chalons sur Saone organizis pilgrimadon al la tombo de la eksprezidanto de la Federacio de Bourgogne, prof. Bord en Lahene, mortinta en 1919. Florakrono estas metita sur la tombon.

Aliĝis al la deziroprimio por Esperanto de francaj membroj de la Scienca Akademio s-oj Emile Borel, prof. en la Sorbonne, prof. Jean Perrin kaj Schlesing.

#### Hispanujo.

El ĵus ricevita letero el Cádiz ni legas, ke s-o J. Gill Norta, ŝatata protektanto de ET kaj prezidanto de la Kataluna Federacio Esperantista denove veturas Mez- kaj Sud-amerikon por komercaj aferoj ĝis fino de 1924. Bedaŭrinde li pro tio ne povos kiel kutime fervore subteni la Esperanto-laboron de niaj katalunaj amikoj. Tamen komprenante la nealigeblon de la faktoj, ni deziras al s-o Gill Norta agrablan vojaĝon kaj plej bonan sukceson.

#### Nederlando.

Utrecht. La 16. novembro ekzistos la Rondo Utrehta Esperantista dudek jarojn. Oni festos kredeble la 18. nov. tiun dudekjaran ekziston. Programoj, scilgoin, cirkuleraj ktp. sekvos poste. Oni esperas, ke tiu tago bone sukcesos kaj ankaŭ, ke multaj personoj venos. J. A. v. Dort.

#### Svisujo.

En Zürich fondiĝis nova Esperanta societo sub la nomo „Esperanta Grupo de la Komerca Societo Zürich“, kiu celas disvastigi Esperanton inter komercistoj ĉi tie. La komitato konsistas el la sekvantaj personoj: prez. s-o E. Müller, Rotstr. 55; vicprez. Paul Enz, Rajn 45, Altstetten b. Zürich; l. sekr. Isaak Weinberger, Garienhofstr. 21; ll. sekr. Justav Höhn, Rotachstr. 9; kas. Karl Dürr, Schrenngasse 3; ĉiuj sinioroj en Zürich.

Ĝi kolektas kaj disvastigas speciale Esperantajn prospektojn kaj iradukas ilin germanen. Jam en diversaj gravaj svisaj gazetoj ĝi represigis informojn pri internaciaj firoj ktp.

### Asocio de Germanaj Instruistoj Esperantistaj.

Dum la mondkongreso en Nürnberg, la asocio okazigis sian ĉefkunvenon la 3. aŭg. Ĝi estis tre multnombre vizitata. La jarraporto anoncas vigan progreson de la Esp. movado interne de la germana instruistaro. Ankaŭ ĉe la registaro kreskas la intereso por nia afero. La ministerio por scienco, arto kaj popolklerigado deziras ekscii la nomojn de tiuj instruistoj kapablaj instrui Esperanton. — Oni deziras preskaŭ ĝenerale la aliĝon al la „Edukista Internacio“, kiu dum la venonta kunsido de la internacia instruistaro unuanime estas akceptita. La germanaj instruistoj nun povos labori manon en mano kun siaj eksterlandaj gekolegoj por efektiviĝi la „Novan lernejon“. Certe multpromesanta progreso. La internacia instruistaro nun ankaŭ havos propran organon en „Novaj tempoj“. Ĉiuj progresemaj gekolegoj legu ĝin! La kotizoj estas enkasigataj estonte pokvaron-jaraj. La kotizoj pagotaj nun la 1-an de ĉiu kvartalo estu po la kvarono de la ekzistanta simpla literafranko. Estas honordevo de ĉiu progresema kolego aliĝi al la Asocio de Germanaj Instruistoj Esperantistaj kaj varbi por ĝi. La lastaj grupoj precizigu dum la venonta jaro sian opinion pri ekzamenoj. La estraro estas reelektita.

## Politiko.

### Pacifismo.

La pacifista komitato, „Virinoj, kion vi faras?“ en kunlaboro kun diversaj nederlandaj porpacaj unuigoj disvastigas ĵus la sekvantan alvokon rilate al la internacia situacio politika:

#### Manifesto al la Membroj de la Ligo de Nacioj.

Fidante je Via kreskanta potenco, en la firma kredo ke iam la Ligo de Nacioj estiĝos ligo de ĉiuj popoloj, ni petas al ĉiuj ĝiaj membroj iniciati tialn paŝojn, kiuj povas konduki al paca solvo de la nuna konflikto inter Francujo kaj Germanujo, por ke la trankvilo revenu en la mondon kaj la ĝenerala rekonstruado povas komenciĝi.

#### Manifesto al la Neŭtralaj Landoj.

Ni neŭtraluloj havas belan taskon, ni estas destinitaj unuigite formi firman fortikaĵon kontraŭ la perforto, centrejon por la pacideo kaj propagando por la paco en ĉia formo.

Unuigite ni povas instigi la publikan opinion en niaj landoj kaj ankaŭ eksterlande al la pacideo kaj la deziro al justeco, por ke ĉie disvastigu ne sole la konvinko, ke perforto estas malutiliga, sed por ke ankaŭ vekiĝu la sincera volo anstataŭigi malkonfidon kaj dividecon per konfido kaj kunlaboro.

#### Al la Popoloj de Eŭropo kaj Ameriko.

Junio 1919 la armiloj estis formatataj.

Nun ni skribas Julion 1923.

Neniam ni pli sopiris al vera paco kaj ĉirkaŭ ni estas tamen tiom da malamo kaj malkonfido. Neniam la manko al laboro kaj produktado estis pli granda kaj kiom da senlaboreco regas en multaj landoj. Neniam oni sentis pli grandan bezonon je spirata renoviĝo kaj kiel granda estas la morala kaj spirita sovaĝiĝo.

Sed neniam ankaŭ la mondo estis pli laca pro ĉiuj tiuj kontrastoj kaj pli deziranta al ekvilibrado.

Tial la subskribintoj, ĉiuj reprezentantoj de diversaj unuigoj en Nederlando alvokas la popolojn.

Ni alvokas la francan kaj belgan popolojn ke ili en ĉi tiu malfacila tempo faru ĉion, kio igas popolon vere granda, ke ili helpu ĉesigi la okupadon de la Ruhrdistrikto, kiu estas ne sole por la okupata lando morala kaj ekonomia

katastrofo, por ke la trankvilo revenu en la mondon.

Ni alvokas la germanan popolon, ke ĝi faru ĉion eblan por pagi sian ŝuldon, por ke la fido de la kontraŭuloj revenu.

Ni alvokas la Italian popolon, ke ĝi per sia vigla forto kunlaboru por helpi al la forigo de la konfliktoj.

Ni alvokas la anglan popolon, ĝi uzu ĉiun sian volforton kaj trankvilanimecon por trovi honestan kaj justan solvon de ĉiuj malfacilaĵoj.

Ni alvokas ankaŭ la amerikan popolon, por ke ĝi helpu malimpliki tion, kio preskaŭ ŝajnas nesolvebla, kaj ke ĝi forlasu sian izolecon.

## Socia vivo.

### La Internacia Labora Oficejo kaj la sano de la laboristo.

Unu el la plej rezultplenaj partoj de la agado de la Internacia Labora Organizaĵo estas tiu, kiu koncernas la antaŭforigon de industriaj malsanoj kaj la reguligon de laborkondiĉoj en danĝeraj laboroj.

La Packontrakto, kiu starigis la Organizaĵon, montras en la antaŭparolo al la Parto XIII diversajn rimedojn per kiuj estas urĝe plibonigi la kondiĉojn de laboro. Inter tiuj rimedoj troviĝas „la protekto de la laboristo kontraŭ ĝeneralaĵoj kaj profesiaj malsanoj kaj laborakcidentoj.“

La Internacia Labora Konferenco, kiu kunvenas ĉiujare, estas balotinta tri projektojn de konvencioj kaj kvin rekomendojn rilatajn al la protekto de la sano de la laboristo, tio estas:

1. Rekomendo, ke la okupado de virinoj kaj malpli ol 18-jaraĝaj junuloj estu malpermesata en iuj nomitaj laboroj, en kiuj ekzistas danĝero de plumbo-venenado.
2. Rekomendo instiganta ĉiun ŝtatembron de la Internacia Labora Organizaĵo, starigi kiel eble plej baldaŭ ne nur sistemon de efika laborinspekto, sed ankaŭ publikan servon kun speciala komisiono protekti la sanon de la laboristoj.
3. Rekomendo celanta la aplikon de rimedoj por la desinfektado de lano infektita per karbunkolsporoj, aŭ en la lando eksportanta la lanon, aŭ, se tio ne estas praktikebla, en la enira haveno en la lando enportanta la lanon.
4. Rekomendo instiganta ĉiun landon, kiu ne jam faris tion, aliĝi al la Berna Konvencio de 1906 pri malpermeso de la uzo de blanka fosforo ĉe la manufakturo de alumetoj.
5. Projekto de konvencio malpermesanta kun iuj esceptoj la uzon de plumboblanco kaj plumbosulfato por la interna pentrado de konstruaĵoj, post ses jaroj de la fermo de la tria Kunsido (1921) de la Internacia Labora Konferenco.
6. Rekomendo instiganta la Ŝtatembrarojn de la Organizaĵo, etendi al agrikulturaj salajruloj la leĝojn kaj regularojn starigantajn sistemojn de asekuro kontraŭ malsano, maljuneco, ktp.
7. Projekto de Konvencio ordonanta la etendon al agrikulturaj salajruloj de leĝoj kaj regularoj certigantaj al laboristoj kompenspagon por la rezultoj de akcidentoj okazantaj kaŭze de aŭ dum la daŭro de ilia laboro.
9. Projekto de konvencio ordonanta, ke infanoj kaj malpli ol 18-jaraĝaj junuloj estu okupataj surŝipe, nur kondiĉe de prezento de kuracista atestaĵo.

Multaj el la ŝtatembraroj de la Organizaĵo jam zorgis pri rimedoj por la aplikado de tiuj projektoj de konvencioj kaj rekomendoj en iliaj teritorioj. Ekzemple, rimedoj por la aplikado de la rekomendo pri la protekto de virinoj kaj infanoj kontraŭ plumbovenenado jam estas alprenitaj en Aŭstrio, Germanujo, Granda Britujo, Hindujo, Nederlando, Polujo kaj Svislando kaj samcelaj rimedoj estas fariĝantaj en Brazilio, Ĉilio kaj Portugalujo. Internacia Labora Oficejo.

## Bibliografio.

Maŝinfaka Esperanto-Vortaro Prielementa de Eugen Wüster. Germ. e'dono. Eld. F. Hirt & Sohn, Leipzig, 1923. (Komparu avizon en ET n-o 145.)

Ai la aviza noto oni ne bezonas aldoni tre multan. La libro estas tre zorgema laboro de sperta vortaristo kaj fakulo. La libro respondas ĉiujn demandojn en tiu speciala sfero ĝis vasta limo. Rimarkinda estas la zorgega detalingo de ĉiuj fakvortoj samspecaj. Tiel ekzemple la klarigo pri aksoj enhavas ne malpli ol 25 div. specojn da aksoj. Sub „bori“ 40 esprimoj estas indikitaj ktp. Iom stranga unuavide estas la arango kun referencaj nombroj. Ekonomiaj cirkonstancoj devigas al tiu procedo, kiu ebligas kiel plej eble ampleksan kolekton de fakvortoj sur minimuma spaco. Serĉante en la germana vortoparto la koncernan Esp. vorton, oni facile trovas ĝin per la indikita referenca nombro. Simile al la taktiko de aliaj aŭtoroj de lastempe aperintaj vortolibroj, s-o Wüster indikas en sia libro ĉiujn ĝis nun ekzistantajn fakvortojn, uzatajn aŭ neuzatajn, uzindajn aŭ neuzindajn. Sekve de tio oni trovas ekzemple la malpli uzindajn „vinkto“ kaj la pli praktikan „nito“, la konfuzigan laŭ Verax „soldi“ kaj la sole akceptindan „veldi“ ktp. Tre prave oni evidente supozas, ke la praktiko jam forpuŝos la netaŭgajn vortojn, sed ĉu stabila fundamento ne estas pli sekura? — Entute: la libro estas taŭga helpilo kaj oni devas deziri, ke la aŭtoro — ankaŭ sperta teknikisto — aperigu ankoraŭ aliajn volumojn, bonaj helpiloj ankaŭ en la mano de nefakulo. R. Kr.

Ni atentigas pri la prospekto aldonita al tiu ĉi numero.

La aŭgusta numero de „Revuo“, kvankam jam presita, pro teknikaj kaŭzoj ne plu povis esti aldonita al la ĉi-jena numero. Ĝi pro tio sekvas kune kun la sekvonta numero.

### Negocaj informoj.

Antaŭ ne longe aperis la unua volumo de la granda Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana de Eugen Wüster. La tre grava eldonaĵo ĉie trovis la merititan laŭdon al la aŭtoro kaj la eldonejo. Same grava tamen estas la aperigo de la sekvantaj volumoj, ĉar nur la kompleta vortolibro ebligas utilan uzon kaj superrigardeblon pri la riĉeco de Esperanto. Oni ĵus invitas al antaŭmendo de la dua kaj tria partoj. Al nia hodiaŭa numero detala prospekto de la Firmao Hirt & Sohn, Leipzig, Salomonstrass 15 estas aldonita. Ni rekomendas ĝian enhavon al la nepra atento de ĉiuj aktivaj seriozaj Esperantistoj.

### Parolejo.

#### 196. Rilate respondpoŝtkartojn.

Kelkfoje mi estas sendinta respondpoŝtkartojn en aliajn landojn kaj sufiĉe kelkfoje la respondo ne ricevinta. Mi ne kredas, ke homo ne havas la tempon respondi nur per kelkaj vortoj, almenaŭ sciigante pri neplenumebleco de la peto, sed devas esti alia kaŭzo. Laŭ mia opinio ekzistas unu kaŭzo, kiun estigas nesacio pri la poŝta agado. Jen la afero: En kelkaj landoj, stampante la respondkartojn, oni metas stampon ankaŭ sur la revenonta poŝtkarto apud la postmarko (pli frue oni stampis eĉ postmarkon de revenonta poŝtkarto). Tia procedo estas starigita antaŭ nelonge kaj kredeble ne en ĉiuj landoj. Tial ĝi estas por multaj ne ŝciata, kaj ricevante tian poŝtkarton oni ne resendadas ĝin kredeble tial, ke oni opinias ĝin nevalora plu kaj laŭ ili la ricevanto devas pagi duoblan afrankon, kion la unua ricevinto ne volas kaŭzigi al la sendinto. Mi atentigas, ke tiaj poŝtkartoj estas ankoraŭ valoraj kaj oni povas ilin resendi, ne timante elspezigon ĉe la ricevanto.

J. Vahkeri, Tallinn.

#### 197. „Sovet“ aŭ „Sovjet“.

La rusa vorto „COBEM“ estas ne nur konata en la tuta mondo, sed eĉ enradikiĝis en multajn eŭropajn lingvojn. La samo okazis ankaŭ en Esperanto. Tamen, legante Esp. gazetojn, mi rimarkis, ke ĝi estas transskribata jen „sovet“ jen „sovjet“. Ĉar la litero e estas prononcata de rusingvanoj mole, malsimile al alinacianoj (por la malmola sono e ekzistas en rusa alfabeto alla litero), mi opinias esti pli bone, se la vorto estas transskribata laŭ sia ĝusta prononco t. e. sovjet. R. Lorentson, Tallinn.

#### 198. Pri regionismo kaj Esperantismo.

Permesu al mi respondi al unu el la lastaj parolejeroj subskribitaj de s-o Is. Kataluna lingvo ne estas dialekto de latinida, sed tute sendependa idomo, kiu la historio ne favoris tiom, kion la hispanan. Kataluna lingvo havas sian literaturon, sian gazeton, sian propran teatron, diference de la hispana, kaj katalunlingvanoj ne sin sentus reprezentitaj en la Lingva Komitato, se nur la hispana lingvo havus reprezentantojn. Esperantismo ne estas pedanta, se ĝi havus en la L. K. reprezentantojn de baska aŭ irlandaj lingvoj; tio, kontraŭe, estus pruvo de respekto al tiuj lingvoj. La fakto, ke lingvo ne estas oficiale parolata en iu lando, ne povas esti argumento kontraŭ ĝia reprezentigo. Finnlando kaj Ĉeĥoslovakio havis jam antaŭ ilia sendependiĝo reprezentantojn, kaj neniu protestis. Al la demando „ĉu katalunoj ne apartenas al Hispanujo“ mi respondas — jes. Tute same kiel Finnlando apartenis al Rusujo kaj Ĉeĥoslovakio al Aŭstrio antaŭ la milito; ĉar Katalunujo estas nacio submetita al Hispanujo, kaj katalunoj preparigas por fariĝi sendependaj. Se tiun netoleremon, kiun montras s-o Is, montras la ĉefaj institucioj de Esperantismo, mi estas certa, ke katalunoj ne estus en la antaŭaj postenoj de nia movado; sed ĉar ĉiam tiuj institucioj montris respekton por nia lingvo, pro tio ni volas konservi nian lokon en la Esp. movado. Kataluno, Barcelona.

## Kyokko-Sya

Eksportistoj kaj Importistoj

en

Terkulturaj maŝinoj kaj trenmaŝinoj, Motoretoj agrikulturaj kaj industriaj, Ter- kaj ĝardenkulturaj iloj kaj medikamentoj, precipe insektmortigiloj, Arbidoj, semoj, agronomiaj kaj arbaraj produktoj.

Oni korespondas Esperante.

Oficejo: TOKIO, Ŝibako, Hamamacu-ĉo III-1.

Telefono: Ŝiba N-ro 821 kaj N-ro 2876.

### Por serioza propagando

havigu al vi la ĵus aperintan artiste aranĝitan dulingvan broŝuron Germanan-Esperantan

#### Pri la solvo de l' problemo de internacia helplingvo por komerco kaj trafiko

Oficiala raporto pri Venezia kun laŭcela antaŭparolo de Robert Kreuz.

Skribu ankoraŭ hodiaŭ al

Messamt (Esperanto-fako),

Frankfurt am Main Germanujo.

Fumu

### La Esperanto-Cigaredojn

„Tutmonda Esperanto“

„La verda stelo“.

Cigaredomanufakture Antehmo, Zittau (Saks).

Baldaŭ aperos

### Eŭropo ĉe la abismo

de

#### Francesco Nitti

lama ministrara prezidanto itala

#### Esperanto-traduko

kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.

★

Petu prospektojn kaj detalojn kaj sendu antaŭmendojn je favorprezo al

Frankf. Societäts-Druckerei G.m.b.H., Abteilung Buchverlag, Frankfurt a. M.

Korespondo en Esperanto. - Ilustr. kartoj rifuzotaj.

### Pruvoj instruas plej bone

ke vi aĉetas bonstojajn pantalonojn ĉiuspecajn ktp. plej profite ĉe mi.

Inter aliaj skribas s-o P. S. en Sheffield: „mi devas laŭdi vin pro la bona formo kaj la bona maniero, kiel vi faris la pantalonon...“

Simile esprimas sin ankaŭ aliaj klientoj.

### Tial provu ankaŭ vi!

Facile komprenebla mezur-sistemo. Malalta prezo. Baldaŭa livero. Eksporto ĉiulanden. Malkaraj sendkostoj. Ankaŭ vendado de ne prilaborita ŝtofo. — Postulu detalan oferton kontraŭ poŝtmarko aŭ stampit. resp. kup. de

Joh. P. Schmidt, Zittau I./Sa. 85 (Germanl.) Esperanto uzata!

### Anoncetoj.

ANGLA MONO PAGOTA (GRANDA SUMO) por ekzemplero de OSTRONIERAJ TESTAMENTOJ EN RUSA LINGVO, La Vostokov au faksimilo. Skribu al HIRST, 19 Lion Chambers, Huddersfield, Anglujo. [7]

KELKSEMĴAN RESTADON ĉe klera familio en Svisujo, Italujo aŭ Francujo, ev. ankaŭ en alia lando deziras samideanino (germano el Ĉeĥoslovakio, edzino de kuracio). Eventuale ŝi rekompence gastigus post la reveno dum kelkaj semajnoj knablon. Detalajn sciigojn oni bonvolu direkti al Komerca Instituto „Esperanto“ en Jägerndorf, Ĉeĥoslovakio.

DANA AŬTORO (s-o C. Jacobi, „Bakkehuset“, Holbaek, Danujo), kiu interesiĝas pri klerigo de laboristoj, ekinteresiĝis ankaŭ por Esperanto kaj pripensas ĝin enkondukigi ĉe Laborista Vesperlernejo. Samideanoj, kiuj bone spertis pri E. Inter Laboristaro, bonvolu skribi informige al li — sen demando ilian respondon. Laborema Delegito. [2]

INSTRUISTO HEBREA, 27-jara, kun universitata instruiteco serĉas postenon eksterpollande. Instruas hebreajn lingvon, biblion kaj novhebrean literaturon samkiel ĉiujn ĝeneralajn lernaĵojn. Majstras la lingvojn: hebra, germana kaj angla, konas la francan kaj Esperanton. La proponojn kaj demandojn adresu tute: s-o Leopold Dreher, Starowiŝna 37, Kraków (Polio). [1]

MILITINVALIDO petas bonkorajn samideanojn subteni lin per monhelpo, por fondi malgrandan vendejon. Bonvolu skribi al Esperantista Rondeto en Aschach a/Donau (Aŭstrio). [1]

FILATELISTO! Kiu sendas al mi 100—1000 poŝtmarkojn sialandrin nedifektajn, ricevas saman kvanton de Hispanujo laŭ Yvert 1923. Gabriel Alomar, Prez. de EKP, str. Valloj. 14 en Palma de Mallorca (Hispanio). [2]

GERMANO 20-jara deziras iri eksterlanden. Oni skribu al E. Klotz, poste restante Königsberg i. Pr. (Germ.). [2]

### Korespondo kaj Interŝanĝo.

Kial ni vivas? kaj pri similaĵoj temoj deziras korespondi kun la tuta mondo Eduard Augsten en Friedland i. B. 732 (Ĉeĥosl.). [2]

Bernardo Orlando, aktoro, en Stuttgart, Kriegsbergstr. 22 (Germ.), interŝanĝas pm. kun la tuta mondo. Kiu sendas 100—1000 sialandajn, ricevos saman kvanton de mia lando. [2]

F-inoj Tatiana Nekrasova kaj Mario Stanileviĉ, Novonikolaevsk, ulica Krilova 17, Siberio, interŝanĝas pm. kun ĉiuj landoj. Nepe respondas. [1]

S-o Vasil Lobanov, str. „Lomska“ 45, Sofia (Bulg.), deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj. [1]

Esperanta grupo deziras korespondi kun geesperantistoj de la tuta mondo. Skribu al s-o Paul Renner, Oberwüsteglersdorf 48 (Schlesien, Germ.). [3]

S-o Otto W. Ferguson, Jeffersonville, Indiana (Usono), deziras interŝanĝi naciajn ĵurnalojn kun ĉiuj landoj escepte centraj eŭropaj. Li ne interŝanĝas pm. [2]

S-o Josef Hašek, Liberec (Ĉeĥosl.). Sukerova 38, deziras interŝanĝi vidajkartojn, leterojn kun ĉiuj landoj. [1]

D-ro Aledaro Cziglányi, tribunalsekretario, Pécs, Törvény-szek Munkácsy str. 2 (Hung.), deziras komenci interesan nebanalan korespondadon kun gesinjoroj de ĉiuj landoj per l. kaj pk. il. [1]

S-o Erik Carlén, Yxhult, 17-j-a gimnaziano, Kumla (Svedio), deziras korespondi kun ĉiuj landoj pk. il., l. Interŝanĝas pm. [1]

Mi deziras interŝanĝi il. pk. kun ĉiuj landoj. Unu aŭ kelkaj ĉiujfoje en koverto. Havas belajn kartojn de industriaj urboj. S-o Johann Orazem, Klosterstr. 46a, Hamborn, Germ. [1]

S-o Teodor K. Popov, Petriĉ (Bulg.), deziras korespondi stenografie laŭ la Gabelsberger'a sistemo Esperantigita de D-ro Albert Schramm; deziras renovigon de la korespondado kun siaj iamaj gekorespondantoj. Ne suferas je filatelista malsano kaj nepre donos pugnon al tiu-specaj kompaŭnduloj. [1]

S-o W. Bartels, Braunschweig, Lessingpl. 3, Germ., deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. [1]

Samideano Rudolf Reeh, Trautenau, Kaiserstr. 3, Bohemujo, interŝanĝas, vendas kaj aĉetas pm. kun la tuta mondo. Fuŝosendaĵoj malakceptataj. [2]

Pri radio-telegrafo kaj telefonio volas korespondi kun ĉiulandaj amatoroj Martti Thlander, Orioniukatu I. p. A. h. 2, Helsinki (Finnlando). [1]

Willy Staron en Oels i. Schles. (Germ.), deziras interŝanĝi ĉ. 50—80 bonajn pm. kun seriozaj kolektantoj. Donas 80 diversajn germ. pm. [1]

Fraŭlo Michał Kuczawoj, Nieswicz (Polujo) deziras korespondi per poŝtkartoj, poŝtmarkoj kaj monbiletoj kun la tuta mondo. [1]

12 valorajn bildkartojn, montrantajn la morojn, kostumojn, kantojn de la germanoj sendas kontraŭ 2 sv. fk., 2 sv. kr., 1 guld., 1/2 dol. aŭ samvaloro en registrita letero. Bruno Gähler, Trautenau, Anastasiusringasse 3 (Ĉeĥosl.). [2]

Juna fraŭlino, poŝtoficistino, deziras korespondi poŝtkarte kun inteligentaj samideanoj de la tuta mondo. F-ino Karin Rosin en Söderhamm, Sved. [3]

Fraŭlo Kiril V. Dragomirov, IV ŝtastak No. 331, Gorna Ĝumaja (Bulg.), deziras korespondadi kun ĝelunuloj el la tuta mondo pri kiaj ajn temoj. [1]

50 ĉeĥoslovakajn pm. ricevas ĉiu por 50 alilandaj pm. Rudolf Weiss, Dux X 549, Bohemujo (Ĉeĥosl.). [1]

S-o Fritz Schulze, Oststr. 155 en Göppersdorf b. Burgstädt (Germ.) deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun la tuta mondo. Mi respondas ĉiam kaj al ĉiuj. [2]

S-o Erwin Fiss, Bärenstein, Bez. Dresden, Schlossmühle (Germ.), deziras interŝanĝi pm., pk. kaj papermonon kun la tuta mondo. [2]

S-o Isaj Drajwer, Warszawa, Muranowska 26/32 (Polujo), elsendas por 1 sviz. fk. aŭ egalvaloro 15 sovjetajn kaj 10 polajn poŝtmarkojn. Ĉiuj bonkvalitaj, diversaj, nedifektitaj. Ankaŭ interŝanĝas pm., pk. (bfl.) kaj korespondas. [2]

Kiu helpas al studanto de hindustania lingvo per korespondado pri tiu lingvo kaj pri hindaj literaturo kaj popolokutimoj? Skribu, nomante ian ajn servon, kiam mi povos miavice fari, al s-o Reggie Hope, 733 Broadway W., Vancouver, B. C. Kanado. — Urdu-Zabán-Men-Likhtye. [2]

Bonkoraj Kuracistoj! Mi malsaniĝis antaŭ 4 jaroj de spin-kurbiĝo, sed ĝis nun mi ankoraŭ ne resaniĝis. Laŭ la konsiloj de la tielaj kuracistoj mi portis gipskorseton dum 4 monatoj, sed sen utilo, ĉar laŭ ilia opinio la kurbiĝo estas tre malsupre. Se iu el via scias certan kuracilon aŭ bonajn konsilojn, mi petegas vin helpon al mi. Aleksander Parov, Miladinova 21, Rusĉuko (Bulg.). [2]

Filatelio „Verda Stelo“ Boris P. Kavajliev, s. Rjajhova, Rusensko (Bulg.). Vendas ĉiujn bulgarajn p. m. je kompletaj serioj aŭ laŭ mankolistoj; la vendataj p. m. estas perfektaj kaj aŭtentikaj ekzempleroj. Oni plenumas nur antaŭpagitajn mendojn; la akurateco estas fiero; prezoj favoraj, postulu prezaron! [1]

Poŝtmarkojn el orientaj landoj vi plej malkare aĉetas ĉe Eldonejo „Esperantista Voĉo“, en Jasto (Pollando). Ni sendas pm.-elektojn kontraŭ bonaj referencoj aŭ mondepono. Interŝanĝas pogranda; fuŝosendaĵoj malakceptataj. [4]

S-o Reinhard Müller Berthelsdorferstr. 48. en Freiberg/Sa (Germanujo) deziras interŝanĝi il. pk., let. pm. kaj papermonon kun ĉiuj landoj. [1]

S-o Conrad Creter, poŝtinspektoro Oberpostdirektion en Köln (Germ.) deziras korespondi kun gesamideanoj el la tuta mondo per il. pk. (bfl.). [1]

S-o Franz Hecker, Gneisenaustr. 3 III. kaj Richard Prause, Kirchstr. 2, ambaŭ en Waldenburg i. Schl. deziras korespondi kun ĉiuj landoj per il. pk., por perfektigi en Esperanto. [1]

Mi deziras korespondon kun seriozaj kaj idealaj fraŭlinoj, inter 18—20 jaroj, de la tuta mondo, per let. kaj il. pk. pri interesaj kaj sciencaj temoj, Esperante aŭ angle. Robert Pandikow, Peilboot III, Wilhelmshaven (Germ.). [3]

S-o Gustav v. Gasperini en Graz, Bismarkpl. 31. (Aŭst.) deziras korespondadi per il. pk. (bfl.) kaj letere kun la tuta mondo pri ĉiu temo (prefere pri agrikulturo) [1]

## NIPPON-★LANDO.

### „Uyeno“ Komerca Kompanio

Importo kaj Eksporto

Oficejo: TOKIO, Marunouchi Building.

Oni korespondas Esperante.

## Esperanto kun BES-a Adresaro

estas nova kaj felika paro, kiu amikigas trans monto eĉ maroj!

Ĵus aperis 5-a eldono de „BES-a Adresaro“, kun portretoj de Esperantistoj! — Prezo 1 sv. fk.

Postulu senpagan prospekton de l' eldonanto; Bohema Esperanto-Servo, Moravany, (Boh.), Ĉeĥoslovakio.

